

## Radio Ĉerizo 12

2011-05-26

Radio Ĉerizo parolas pri komputilo.

Antaŭ pli ol 30(tridek) jaroj, mia komputila vivo komenciĝis de studo de duuma aŭ binara nombrosistemo, kaj mem faris programerojn en asemlingvo; sed por gajni plian rapidecon iu parto estis programita de maŝin-kodo en 16-uma(dek sesuma) nombrosistemo. En 1969(mil naŭcent sesdek naŭ), en televidilo mi trovis, ke unu el astronautoj aŭ kosmonaŭtoj manipulas la komputilon de spacŝipo Apollo 11(dek unu), kie troviĝas klavarojn kun nombro de 0(nulo) ĝis 9(naŭ), de A ĝis F, kaj aliaj kelkaj klavaroj. Ĝi havis ne tutan alfabeton, ĉar la komputilo akceptis kordigon nur en maŝin-kodo, en 16-uma(dek sesuma) nombrosistemo.

Programado en maŝin-kodo bezonas longan tempon, tial mi konsciis, kiel malfacile estas kontroli la ŝipon tiam!

Dek jaroj pasis. En iu oficejo mi komenciĝis manipuli 8(ok)-bitan komputilon kun 8(ok) kilobajtan ĉefmemoron kaj 5(kvin)-colan flekseblan diskosistemon, registreblan tiam grandan kvanton, 50(kvindek) kilobajtojn po unu disketo! Mi mem elfaris program-

erojn de tabelkalkuro, uzante bazikan lingvon. Tiam mastruma sistemo estis ne komuna, sed laŭkompania.

Post tio aperis CP/M por mastruma sistemo, mikrosofta diskosistemo, poste vindozo, kaj Trono kreita en Japanio, kio apenaŭ malestiĝis pro komerca premtrudo fare de Usono, kiu volis utiligi MS-sistemon. En 1992(mil naŭcent naŭdek du) MS-vindozo versio 2.11(du punkto unu unu) estis tre peza. Ĝi postulis pli grandan kvanton da memoro. Kontraŭ tio, tron-vindozo facile moviĝis sur simila sistemo, uzante nur 2(du) sistemdisketojn. Kiam oni atendis iomete, ekrane estis montrita japaneca piktogramo aŭ bildsimbolo en te-taso premita de mano, kun ŝanceliĝanta vaporo sur ĝi, kontraŭ ŝutorloĝo aŭ sablorloĝo de MS-vindozo.

Nun mi ŝatas linuksan vindozon, kaj ĉefe uzas open-oficilon. Manuskripto de ĉi tiu elsendo estas skibata per ĝia "Skribilo".

Krome, ĉu vi scias, ke vindozo kuras en la sama ordo de la japana lingvo? Pripensu kiel vi komencas softvaron. Vi puŝas butonojn laŭ ordo: "ĉi tiun programeron" - "malfermu". Kiam vi kopias liniojn de dosiero, vi uzas muson tiamaniere: "de ĉi tie" - "ĝis

ĉi tie” - “kopiu” - “al ĉi tie” - “al-  
gluu”. Se vi kalkulas “2 + 3”(du plus  
tri), tio plenumiĝas en memorĉeloj  
de komputilo: “du” - “tri” - “plus”.  
Komando estas ne eŭropeca. Tio  
estas nomata “inversa pollanda  
sistemo”. Vi bone ekscios tion, se vi  
lernos pri maŝin-kodo. Ĉu ne  
interese?

Hodiaŭ Radio Ĉerizo volis  
paroli pri “bluradia disko”, sed ne  
intence parolo iris al komputilo. En  
alia ŝanco mi rakontos pri ĝi.

Salutas Belmonto el suda  
Japanio. Ĝis reaŭdo.

Originale:

*mikrosofta diskositemo*

*Microsoft Disk Operating System*

*[MS-DOS]*

*MS-vindoza*

*Microsoft Windows*

*open-oficilo*

*OpenOffice*

*Skribilo*

*Writer (OpenOffice.org)*

*bluradia disko*

*Blu-ray Disk*

Pardonpeto:

*registreblan -*

*ŝajne mi parolis “registreblan”*